# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

**PLENUMITA 15/04/2021 Kvincentdudeksesa eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron


Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo* *Google Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo* *Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## Entute 824,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo




Nun studas **290,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **239,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **216,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **79,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde junio 2021)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*

## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).






**N.ro 30 de "Por Komencantoj". GRAMATIKAJ KVIZETOJ:**

Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). La infinitivoj havas unu el du funkcioj: kiel verbo ("Mi volas promeni") kaj kiel substantivo ("Mi deziras promeni" = la promenadon). Ĝi estas verbo nur post la kelkaj t.n. "modaj helpverboj" (ekz. voli, povi, rajti, kuraĝi, devi, ĉe kiuj la infinitivo lingvisme agas kiel sufikso). Post aliaj verboj, kun substantiva funkcio do, kiujn du frazpartojn ĝi povas okupi?

2). La infinitivo, kun substantiva funkcio, povas esti la kernvorto de la subjekto. Ĉu tiam ĝi ĉehavas la vorteton "la"?

3). Ĉiu frazparto havas kernvorton, i.a. verbo por la predikato. Por la objekto ĝi estas plej ofte substantivo. En kiuj kazoj la kernvorto de la objekto ne ricevas la finaĵon "-n"?. *Marcel*.

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***



_La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon._. Ĉiu deka homo konsentas pri konspiraj teorioj | Esperanta Retradio





# Surhavu vizaĝmaskon.

**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn. *Roger Springer*

Kial kontraŭ kronvirusa vakcino estas patentita? *Roger Springer*

Ĉu oni elektas profiton kaj ne multmilojn da vivoj?



La ekonomia sistemo valorigas monon pli ol homaj vivoj. Ĉu vi konsentas?

## Humurbildojn




Multe da humurbildoj (kun komentoj) mi prenas el E-retpaĝoj!
Mi nur por iuj BILDOJ (eble triono?) aldonas mian komenton (rimarkon, ŝercon)...Mi estas nur KUNaŭtoro de iuj bildoj!
Sube estas ligilo al mia magazino de jam prezentitaj humurbildoj...
Iru tien kaj prenu! https://tiny.pl/rn9gc










https://tiny.pl/rn9gc_ Kun elkoraj salutoj ***Marian*** *ZDANKOWSKI*

**La tialo pro kiu mankas informo pri via klubo estas ke via klubo ne sendis ĝin al AE**

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# El Adelajdo

La lasta kunveno de la sudaŭstralianoj okazis la 7-an de aprilo. Ĝi estis la unua ĉeesta kunveno de marto 2020. Ni revenis al nia antaŭa kunvenloko en la urbocentro de Adelajdo, al komunumejo Box Factory.
La ĉefa parolanto estis Trevor Steele. Li rakontis pri siaj spertoj en Arnhemlando dum 1993-94.




*Katja Steele*

# Ĉu Australio nun mortigas homojn en Sirio?

Jan 2021 *Roger Springer*

[Australian jets drop first bombs on Islamic State targets in Syria (news.com.au)](#) [Australians for War Powers Reform](#)




*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917)*



## L a  E ŭ r o p a  U n i o  m a l s u k c e s o s .

**PRO LA ANGLA LINGVO .**

Preskaŭ ĉiuj registaroj de la E.U.-aj landoj deziras la sukceson de la Unio kiel unio. Sed la popoloj pli kaj pli malŝatas ĝin. Kaj ili povos elekti registarojn, kiuj deziras eliri, kiel Britujo faris pro aliaj ialoj. La ialo de la kontinentaj landoj estas la angla lingvo kiel unia komuna lingvo. Ĝi estas taŭga por la malgranda parto de la popolo kiu trovas lerni fremdajn lingvojn

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

facila afero. Sed por la plimulto de la popolo ĝi estas tro malfacila por sukcese lerni kaj mastri. La rezulto estas, ke la malgranda grupo da fluaj parolantoj de la angla lingvo ricevas ĉiujn bonajn laborpostenojn en ĉiu lando kaj la por tiuj laborpozicioj plej taŭgaj civitanoj ne ricevas tiujn por ili tre taŭgajn laborojn. Tio kreas kompreneble grandan malkontenton kaj deziron forlasi la Union. Ju pli ili plifortiĝos politike, des pli aperos registaroj volantaj eliri la Union. Nur facile lernebla lingvo kia Esperanto solvus tiun problemon. La eliro de Britujo havas alian ialon. *Marcel Leereveld.*

## LA SANGO DE LA ESPERANTISTOJ.

Pasintsemajne mi menciis, ke por esti pli klera ol la ordinaraj Esperantologoj, oni devas havi la gramatikajn regulojn en la sango, en la vejnoj. Sed kelkaj gramatikaj reguloj loĝas en la sango eĉ de negramatikemaj Esperantistoj. Ekzemple se ili estas latinidlingvaj, ekz. francoj, ili havas la regulon pri la futuro en la vejnoj kaj aŭtomate scias ke por la futuro oni ne diras *"Nous 'a manger avons"*, sed *"Nous mangerons"*, kaj ke en Esperanto oni ne diras"Ni iras manĝi", sed "Ni manĝos". Kaj tiuj negramatikemaj Esperantistoj kies lingvo estas la angla aŭ la germana aŭ alia ĝermana lingvo aŭtomate scias, kiam ili devas krei novan kunmetitan vorton, ke ili devas ne diri *"The maskface"* por *"The mask for the face"* sed *"The facemask",* nek "La maskvizaĝo" por "La masko de la vizaĝo" sed "La vizaĝmasko". Ĉio tio estas en la sango de la negramatikaj parolantoj. Ĝi estas la spirito de Esperanto, sed ankaŭ la spirito de kelkaj etnaj lingvoj. Ekzistas pli da tiaj envejnaj scioj en la etnaj lingvoj, kvankam ne ĉiam samaj por ĉiuj lingvoj. Do ne malesperu, negramatikuloj! *Marcel Leereveld.*

## STRANGAĴO DE LA ANGLA LINGVO.

Ĝi ne estas stranga por angloparolantoj, nur por lernantoj parolantaj alian lingvon. La angla uzas la helpverbon "*to be*" KAJ por la rezulto de pasinta ago, kiel en "*The door is (now) closed = having been closed in the past)*" (= la pordo nun estas fermita), KAJ por indiki la prezencon (nun-tempon) de la pasiva voĉo, kiel en *"The door is now (being) closed"* (la pordo nun fermatas). Pro tiu dusenceco la angloj preferas, sed ne bezonas, aldoni duan formon de *"to be"*. La aliaj ĝermanaj lingvoj ne bezonas fari tion (kaj ne faras), ĉar ili havas specialan helpverbon, anstataŭ "esti", por indiki la prezencon de la pasiva voĉo. Tiu helpverbo estas "*worden*" en la nederlanda *("De deuren worden nu gesloten"),* kaj "*werden*" en la germana *("Die Tŭre werden nun geschlossen",* "la pordoj nun fermatas". Dum en la angla "*are*" havas du malsamajn tempajn signifojn, en la germana k.t.p. oni uzas du malsamajn verbojn. Tio signifas, ke se oni devas traduki "*The doors are closed*" al aliaj lingvoj inkluzive de Esperanto, oni unue devas scii la temposignifon de la angla esprimo kun du eblaj tempoj. *"The doors are closed just now by the shopkeeper".* *Marcel Leereveld*.

## LOKO GRAVAS .

En la jena frazo la loko de "kun sia edzo" gravas:

Temas pri "Ŝi kun sia edzo" aŭ "Ŝia najbarino kun sia edzo":

"Ŝi laboras kun sia edzo" aŭ "ŝia najbarino kun sia edzo", ĉar prepozicio "kun" funkcias kiel verbo por "si".

"Ŝi laboras por sia najbarino kun sia edzo" devas esti "Ŝi laboras kun sia edzo por sia najbarino" se la signifo estu "Ŝi kaj ŝia edzo laboras por la najbarino". *Marcel Leereveld*.

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# UNESKO UNUAFOJE FARAS ENKETON PER ESPERANTO – UEA ALVOKAS ĈIUJN ESPERANTISTOJN PARTOPRENI

La ĉefa celo de Unesko estas kontribui al paco kaj sekureco en la mondo per kunlaborado inter nacioj per edukado, scienco, kulturo kaj komunikado. Per tio oni antaŭenigas universalan respekton al justeco, al la regado de leĝo kaj al homaj rajtoj, fundamentaj liberecoj kaj toleremo, kiuj estas konfirmitaj por la popoloj de la mondo, sendepende de raso, sekso, lingvo, aŭ religio, laŭ la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj. Unesko ankaŭ kontribuas al daŭripova disvolviĝo kaj protektado de endanĝerigitaj lingvoj. Por evoluigi la realigon de la celoj, ekde 1971 ĝis 2015, Unesko trifoje publikigis serion de Tutmondaj Raportoj pri Edukado kaj planas publikigi la novan raporton *Futuroj de Edukado: Lerni fariĝi* (*Futures of Education: Learning to Become*) en novembro 2021.

Por vaste kolekti ideojn kaj bone prepari la tutmondan raporton, Unesko fondis Internacian Komisionon pri Futura Edukado kun 17 altrangaj fakuloj el diversaj landoj, estratan de s-ino Sahle-Work Zewde, la Prezidento de la Federacia Demokrata Respubliko Etiopio. Unesko publikigis 1-minutan enketilon en 17 lingvoj, inkluzive Esperanton danke al la iniciato kaj traduko de Renato Corsetti.

UEA traktas tion kiel ŝancon por esperantistoj esprimi siajn opiniojn en la tutmonda raporto pri edukado. Tio estos grava ago laŭ la strategiaj planoj disvastigi la idealojn kaj valorojn de Unesko per Esperanto kaj por vidigi al Unesko la utilecon de nia lingvo. Ju pli multaj esperantistoj plenigos la enketilon, des pli klare la lingva valoro estos videbla al Unesko. UEA do alvokas, ke ĉiu esperantisto investu unu minuton plenigi la facilan enketilon laŭ la indiko sur la retejo en.unesco.org/futuresofeducation/top-3-challenges-and-purposes-education/Esperanto aŭ mallonge: bit.ly/enketounesko2021. Ĉiuj Esperanto-organizoj, grupoj kaj kluboj dissendu anoncojn por instigi esperantistojn partopreni! La enketado finiĝos en la **fino de aprilo**.

Por doni nian kontribuon kaj influon al la Tutmonda Raporto de Unesko, UEA planas speciale sendi al Unesko proponan raporton, laŭ la indikoj de Unesko: *kiel edukado povas esti uzata por formi la futurojn de la homaro kaj la planedo: kio devas esti memorata kaj kio devas esti akcentita pri ĉi tiuj du aferoj*. UEA invitas talentajn esperantistojn sendi siajn proponojn al la dua vicprezidanto de UEA, Trezoro Huang Yinbao trezoro@qq.com kaj al la ĉefreprezentanto de UEA ĉe Unesko François Lo Jacomo francois@lojacomo.eu antaŭ la 20-a de aprilo 2021. La proponoj povas esti tre konkretaj aŭ ĝeneralaj . La fina propona raporto devas esti maksimume 1000 vortojn longa.

Atentu: Bonvolu nepre uzi komputilon por plenigi la demandaron, ĉar sur telefono foje ne aperas la fina butono "Sendu". Sendis al AE *Katja Steele*

## Profito aŭ vivoj.



Sen milito, Ĉinujo gajnas amikojn

Malgraŭ tutmondaj vakcinaj mankoj, Ĉinujo eksportas duonon de sia totala vakcina produktado (115 milionoj da dozoj) *Nikkei Asia, 05.04.2021*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas de 10.30 atm ĝis 12tm la unuan kaj trian sabatojn de la monato. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater Cafe 28-29 Suda Stejno. Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. La ĉeestantoj tie diskutas la plej sekuran lokon por la kunveno laŭ la vetero kaj homamasoj. La 17a de aprilo estos la tria sabato. Venu ! Ĉiuj bonvenaj *Roger Springer*

# 3ZZZ



*Inter aliaj ,la temoj de la elsendo de la 12a de aprilo estas edukado kaj virinaj sukcesoj en diversaj kampoj .*

*Franciska Toubale*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917)* **SOLVO DE LA KVIZETO**



1) La objekton kaj la adjektojn.
2) La infinitivo tiam ne ĉehavas la vorteton "la".
3) Kiam ĝi estas infinitivo aŭ adverbo aŭ suborda frazo: Mi ŝatas GLITKURI; Mi manĝis tro MULTE; Mi ne sciis, KE LI ESTAS EN LA MALSANEJO.

*Marcel Leereveld.*

AUSTRALIANS FOR WAR POWERS REFORM

La ĉefminstro havas la eblecon sole sendi nian militistaron por batali ie en la mondo kaj sen konsulto kun la parlamento.

https://mailchi.mp/d36107a818b1/war-powers-reform-bulletin-66-strait-of-hormuz?e=c7f5b89b38



Ciklona damaĝo en Okcidenta Aŭstralio. Ĉu Simila al milita damaĝo? *Roger Springer*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***